Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 8-a de Novembro 2021

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Avigail Meŝulam, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Gabi Zeevi.
***Protokolo** de la pasinta (oktobra) kunsido estis sendita al la estraranoj kaj enretigota.*

1. Raportoj

a) **Amri**: nova israela individua membro de UEA: Inbar Mor, "kanutigita" – laŭ la propono de la UEA-Estraro al ni.
b) **Amri** komencis novan cirklon de "Nicocot" kun 24 gelernantoj.
c) **Amri:** telefonis iu virino iu el la turisma kompanio de Tel-Aviv kun propono organizi denove la UK-on ĉe ni. Sed UEA jam decidis pri kongresoj en la venontaj 3-4 jaroj. Tamen ni ne refutos la ideon, kaj proponis Jerusalemon!
ĉ. La nekrologo pri David-Dvir Dotan (Mager) bezonis pliajn datenojn. Amri turnis al kelkaj homoj, inkluzive lian kunulon, serĉis lian kuzinon eksterlande – kaj finfine la nekrologo estas sufiĉe plena.
d) **Jehoŝua:** pri la kurso kaj materialoj de Amir Naor en la reto.

2. La 22-a Israela Kongreso (Amri, Jehoŝua)

a) **Amri**: Nava ricevis respondon de la hotelo ***Miŝkenot Ruth Daniel***. La prezo estas bona, 900 NIS por dulita ĉambro. Estas problemoj: la vespermanĝo, la elira horo el la ĉambroj, la tro kosta prelegejo ktp. Sed avantaĝas la prezo kaj la loko.
b) **Jehoŝua**: Ni aŭdu la proponon ankaŭ de ***Avraham Hostel*** en Tel-Aviv. en la alia ni jam gastis en 2016. **Gabi**: mi gastis kelkfoje en la originala unua ***Avraham Hostel*** en Jerusalemo – la atmosfero kaj la kondiĉoj taŭgas por dorsosakaj gejunuloj, ne por ni. **Decido**: Nava vizitu ***Ruth Daniel*** kaj persone impresiĝu pri la kondiĉoj.

3. La Zamenhofa Vespero (Jehoŝua)

La granda salono en ***Bejt-WIZO*** estas mendita por mardo, la 14-a de Decembro, 17h00-21h00. La arta programo jam formiĝas, sed Mikaelo estas nun eksterlande, Jehoŝua devas "ĉasi" partoprenantojn por la programo. Mikaelo prizorgos la programon surloke. Ŝlomo proponis oficialajn programpunktojn en aparta letero al la estraranoj (elektoj, balotoj, ktp).

4. La buĝet-plenumo (Ŝlomo)

Ne estis konkretaj rimarkigoj pri la tabelo de Ŝlomo. La elspezoj pri la Dratverejo estis sufiĉe multaj, kaj pro la klimatiziloj kaj pro la post-evikciaj purigo kaj riparoj (kvankam **Amri** laboris multajn horojn volontule, senpage!). La enspezoj el la Dratverejo fluas senprobleme al nia kaso – minus la 5% al la bontena kompanio.

5. Israela Esperantisto (Amri)

Amri devos printigi novajn kovertojn, ĉar ili elĉerpiĝis. **Jehoŝua** helpos al Mikaelo trovi novajn taŭgajn foliojn por la etikedoj. **Amri**: temas pri A4 kun 3 kolumnoj kaj 8 linioj.

…/2

6. <u>Subteno al kontribuantoj por klub-programoj</u> (Amri)
Amri proponas repagi la vetur-elspezojn al tiuj, kiuj pretas kontribui al la klubaj programoj – por vigligi kaj stimuli la membrojn. **<u>Decido</u>**: unuanime akceptita!

La venonta kunsido: lundon, la 6-an de Decembro 2021. La loko – anoncota!

Protokolis: Gabi Zeevi